

Universala Esperanto-Asocio (UEA)
Forumo pri minoritatoj / 4a sesio
29-30 novembro 2011, Palaco de Nacioj, Ĝenevo

Efektiva partopreno de minoritataj virinoj en ekonomio, socio kaj kulturo

Dankon, Sinjorino Prezidanto.

Sinjorino Prezidanto, Gesinjoroj, karaj partoprenantoj,

Mi nomiĝas Stefano Keller kaj reprezentas Universalan Esperanto-Asocion, la organizaĵon de la lingvo internacia neŭtrala kaj egalrajteca, utiligata en la komunikado interetna de civitanoj en pli ol 100 landoj de la mondo.

La lingva diverseco estas fundamenta elemento de la kultura diverseco, kio ofte estas nedisigebla de la biologia diverseco, ambaŭ minacataj de malapero nuntempe.

Utiligi sian gepatran lingvon estas fundamenta homa rajto. Tio estas nemalhavebla elemento por interagoj de personoj partoprenantaj la aktivecojn ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn en la komunumo. Universala Esperanto-Asocio (UEA) subtenas la minoritatajn lingvojn jam de pli ol 100 jaroj.

Dum la hieraŭa kunsido ni plurfoje aŭdis raportojn pri malrespekto de tiu fundamenta rajto, kiu ja estas proklamita en la *Deklaracio pri la rajtoj de personoj apartenantaj al minoritatoj naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj**, aprobita de la Ĝenerala Asembleo de UN en 1992.

La virinoj de minoritatoj ofte alfrontas plurajn diskriminaciojn ekde sia infaneco, tiel ili estas aparte sendefendaj kontraŭ malriĉeco kaj socia ekskludo. Kiel ili povus do partopreni en la ekonomia, socia kaj kultura vivo, eĉ efektive, se ilia fundamenta rajto je kompreno kaj sinesprimo en la gepatra lingvo ne estas ebligita?

Konkretaj paŝoj estas necesaj por lukti kontraŭ ĉiuspeca diskriminacio, kies viktimoj estas la virinoj de minoritatoj.

Mi dankas vin pro via atento.

*Déclaration sur les droits des personnes appartenant à des minorités nationales ou ethniques, religieuses et linguistiques, adoptée par l'Assemblée générale, 1992, 47ème session (A/RES/47/135, 18 déc. 1992) - http://www.un.org/depts/dhl/dhlf/resguidf/resinsfr.htm